Abonu Pilo-Press

**PILO-PRESS**

Internacia

Informservo

Jara abonko-
tizo 30,- GM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 463649; 514269

N-ro 9/78 - 1 mar 1978
Aperas ĉiusemajne

## S E S 75jara

Baden (pp) - La 4-an kaj 5-an de marto 1978 Svisa Esperanto-Societo (SES) kadre de la Svisaj Esperanto Tagoj en Baden festos la 75-an datrevenon de sia ekzisto.

Tiun okazon memorigis ne nur Claude Gacond dum siaj pasintsemajnaj prelegoj en la Svisa Kurtonda Radio, citante el malnovaj numeroj de "Svisa Espero", sed ankaŭ la prelego de d-ro Arthur Baur de la 27-a de februaro en la sama radiostacio (kaj la du sekvaj elsendoj!) temis pri tiu datreveno.

D-ro A. Baur diris i.a.: "Historio ĉiam estas ligita kun nomoj, ĉar homoj faras la historion. Do mi nepre devas mencii kelkajn el la plej gravaj personoj el la historio de la svisa movado. La plej brila nomo certe estas tiu de Edmond Privat. Li lernis Esperanto jam antaŭ la fondo de SES, partoprenis en la fama unua kongreso en Boulogne-sur-mer kaj organizis jam la duan UK en sia hejma urbo Ĝenevo. Estas neeble nomi ĉiujn liajn aktivecojn por la movado, inter 1921 kaj 1928 li efektive estis ĝia gvidanto oferante al ĝi sian personan karieron kiel fakulo pri angla literaturo. Estis li kiu enkondukis Esperanton en la svisan radio. Inter liaj plej gravaj verkaĵoj, kiuj fariĝis klasikaj, estas lia historio de Esperanto kaj lia vivo de Zamenhof. Alia elstara persono estis Hector Hodler, kiu bedaŭrinde mortis jam en 1920, nur 43-jara. Li estis la fondinto de la revuo Esperanto, kiu ankoraŭ hodiaŭ estas la centra organo de la movado, kaj li estis kunfondinto kaj unua direktoro de UEA. Lian torĉon transprenis alia sviso, la bernano Eduard Stettler, kiu jam de 1910 ĝis 1912 laboris libervole en la centra oficejo de UEA, kies vicdirektoro, direktoro kaj prezidanto li sekve fariĝis, ĝis en 1934 li retiris sin pro grava seniluziiĝo...."

La kompleta teksto de la prelego aperos en "Eŭropa Esperanto-Revuo".

## 3-a Ĉe-Balta Esperantista Printempo

Mielno, Poll. (pp) - De la 20-a ĝis la 26-a de majo 1978 okazos en la ripozcentro de Mielno la 3-a Ĉe-Balta Esperantista Printempo, organizita de Pola Esperanto-Asocio, Filio en Koszalin kune kun la Kultura Komisiono de PEA, la Urba Kulturcentro kaj Socikultura Asocio en Koszalin.

El la programo: finalo de la tutpollanda deklamkonkurso, seminario pri "Akceptiĝo de SinjoroTadeo de Adam Mickiewicz en la mondo", konversacia kurso de Esperanto, artaj programeroj, ekskursoj kaj dancvesperoj.

La prezo de la septaga restado egalas al 1 200 zl. aŭ 40 us.dol., oni loĝas en ripozdomoj najbare al la strando.

Pliajn informojn donas PEA-Filio, p.k. 30, PL-75-950 Koszalin, Pollando. Aliĝojn akceptas ankaŭ UEA.

Krome okazas en Pollando: Gdansko - Internacia Teatro-Renkontiĝo (27.5.-1.6.78); Bydgoszcz - Internacia Esperanto-Renkontiĝo (1-4.6.78) Toruno - Etnografia Renkonto (4.-7-6-78)

## Seminario en Poznan

Poznan (pp) - De la 3-a ĝis la 5-a de marto 1978 okazos en Varsovio seminario por gvidantoj sub la nomo " Esperanto serve al la junularo" organizita de Pola Studenta Esperanto-Komitato, ul. Fredry 7, ZW SZSP, PL-61-701 Poznan, Pollando.

Celo de la seminaro estas:

1) Pritrakti la influon de la Fina Akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo al la nuna stadio de internacia junulara kunlaborado.
2) Pritaksi la kontribuon de junulara Esperanto-movado , praktike realigadi kaj aplikadi la progresigajn ideojn enhavantajn en la Pac-Ĉarto de Helsinki
3) Prepari sin al aktiva partopreno en Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Bulgario.

Inter la partoprenantoj troviĝas reprezentantoj de la Junularaj Sekcioj de la landaj Esperanto-Asocioj de Bulgario, Ĉeĥio, Hungario, GDR, Jugoslavio, Pollando kaj Slovakio.

## Esperanto en la Tria Mondo

Nürnberg (pp) - En unu el la lastaj elsendoj de Radio Varsovio oni povis ankaŭ aŭdi intervjuon kun d-ro Victor Sadler, direktoro de CO de UEA, pri la agado favore al Esperanto en la Tria Mondo, speciale in Teherano. Jam kelkfoje ni ankaŭ raportis en ĉi tiu bulteno pri la laboro de ge-s-roj Grattapaglia en Bona Espero kaj Sudameriko, kies sekvo certe estas la 1-a Latin-Amerika Esperanto-Kongreso kaj la en la jaro 1981 okazonta Universala Esperanto-Kongreso en Brasilia.

Unu el la esperantistoj, kiuj sin okupas ankaŭ pri Esperanto en la Tria Mondo, estas s-ro Germain Pirlot, kiu multe korespondas kun esperantistoj en tiuj landoj.

Li transdonis al ni kelkajn lasttempajn korespondaĵojn el kiuj ni citas:

"Mia edzo kaj mi ĵus revenis el la vizito de Japanujo kiun vi trovis esti 'lando de ĝusta kombino de la plej bono de la Okcidento kaj la Oriento'. Dum la vojaĝo ni interesigis multajn por nia kara lingvo!

Mi deziregas, ke estu 'Esperanto-Domo' en Bangaloro(kiu havas dolĉan klimaton tutjare) por servi kiel gastejo por esperantistoj. Ĉu Esperantaj Grupoj povas aĉeti domon ĉi tie? Se iuj interesiĝas mi povas helpi ilin."

S-ino Saranath, 103 Borewell Road
Whitefield 562 136, Bangalore Dist., Hindio

"Ni dankas vin tre kore por via sendaĵo, certe ni bezonas multe da literaturo en la Internacia Lingvo. Ni estis tre kontentaj ricevi vian sendaĵon kaj ni esperas ke dum la nova jaro ni povos interŝanĝi korespondaĵon kun vi.

Kiel vi scias nia klubo estas tre nova kaj la membraro ankaŭ juna.

Nia intereso kaj amo pri Esperanto kreskas ĉiun tagon kaj ni estas decidemaj disvastigi nian karan lingvon tra nia lando.

'Interami' Esperanta Klubo
D-ro Patricio Zurita
Isla Isabela 641, Quito, Ekvadoro"

Cetere, s-ro G. Pirlot (Kemmelbergstr. 5, B.3, B-8400 Oostende, Belgio) ankaŭ eldonis broŝuron pri la jura stato de la lerneja instruado de Esperanto. Bedaŭrinde la enketo ne estas kompleta. Ĝi cetere nun aperas en Heroldo de Esperanto.

## Citaĵoj - reagoj

Dankon por Pilo-Press 5/78. Inter la mencioj, mi trovas ankaŭ iun pri la "Naturamikoj" kaj alian pri "Naturistoj-Nudistoj". Estas bone, ke aperis samtempe tiuj anoncoj, ĉar ni iam - kaj verŝajne ankaŭ aliaj - opiniis ke ambaŭ estas la sama organizo.

15.2.78/470 Esperanto-Redakcio R.V. Piazza Pia, 3, I-00193 Roma

Kun plezuro mi tralegis en Pilo-Press 2-4/78 en daŭrigoj la raporton de mia iama malnova korespondanto d-ro J. Kondor pri sia vizito al via Centro. Tiajn raportojn mi ŝatus legi ofte.

Marinko Ĝivoje, Zagreb-Dubrava

El letero al Esperanto-Centro Luksemburgo.

************************

## La liturgia semajna penso de Radio Vatikana

Ĉi-sekve ni publikigas la liturgian semajnan penson zorge de P. Jacobitti, disaŭdigitan de Radio Vatikana, la 26-an de februaro:

"Unu el la plej belaj paĝoj de la evangelio estas tiu, kiun ni hodiaŭ aŭdis en ĉi tiu tria Karesma dimanĉo: Jesuo, laca pro la irado laŭ la longa sunoplena vojo, sidas, dum ĉiuj disĉiploj iris al la proksima vilaĝo aĉeti ion por manĝi, Sed ĉu nur pro laciĝo restis apud la puto de Jakob li, kiu konas ĉiujn sekretojn de la homa koro, aŭ por renkontiĝi kun animoj, kiujn li atendas por ilin savi? Jen baldaŭ samariana virino: ĝuste unu el la plej malestimataj pro ŝia konata malbona konduto. Sed la interparolo de Jesuo, briligas antaŭ ŝi eblecon de savo. La dia mizerikordo tuŝas koron, kaj ŝi, la unua resanigita kaj savita, hodiaŭ fariĝas anoncantino al ĉiuj: Venu vi ankaŭ. Konu lin. Kaj sekvinte ŝin kaj aŭskultante liajn vortojn, ili povis konfesi: Nun ni kredas, ni mem scias, ke li estas vere la Savanto de la mondo!"

La alia parto de la elsendo konsistis el novaĵoj el la eklezia vivo.

Unu informon el Novjorko ni publikigas: "Tre rara ekzemplero de Biblio en du volumoj, presitaj de Gutembergo antaŭ pli ol 500 jaroj, estos aŭkcie vendata. Oni startos el unu miliono da dolaroj."

En la programo partoprenis P. Jacobitii, E. Puracchio, P. Biedulski.

## La elsendoj de IBRA-Radio

La Esperanto-elsendoj de IBRA-Radio ĉi tie en Nürnberg ĝenerale estas bone riceveblaj, ĉiu-marde, je la horo 21,30 (MET) sur ondo 50,08 m (5 990 MHc).

La venontaj elsendoj (marto ĝis majo 1978) estos:

| Temo | Parolisto | |
|---|---|---|
| La releviĝo kaj la vivo | Erik Carlén | |
| Bartimeo, blinda almozulo | Karl Buremo | Kanto |
| Sankta Vendredo - Pasko | Erik Carlén | |
| La mesaĝo de la kruco | Anna Sandgren | Kanto |
| La releviĝinto kaj la homo | Ragnhild Niklasson | Kanto |
| Pacon Li donas al vi | Bengt-Olof Nilsson | Kanto |
| La vorto kaj la homa parolkapablo | Ragnhild Niklasson | Kanto |
| Letero de Kristo | Bengt-Olof Nillson | Kanto |
| Ĉe la monto de l' ĉieliro | Anna Sandgren | Kanto |
| Printempo - frusomero | Ragnhild Niklasson | Kanto |
| La vinberarbo kaj la branĉoj | Karl Buremo | Kanto |
| Kio estas saviĝo? | Anna Sandgren | Kanto |
| Kion celas la Biblio? | Anna Sandgren | Kanto |

Esperanto en Radio

Ne forgesu aŭskulti kaj skribi al

IBRA - Radio AB , S-105 36 Stockholm, Svedio

Pekino ĉiam estas en Nürnberg relative bone aŭdebla. Ĉi-foje ĝi estis tre aktuala, disaŭdigante informojn kaj raportojn pri la nun okazanta komitatkunsido kaj popola kongreso de la ĉina komunista partio. Ĉiam ankoraŭ oni aŭdas akrajn vortojn kontraŭ la kvarpersona bando.

ORF-Vieno. Tiu stacio, kun la plilongiĝanta tago, estas nun bone komprenebla kaj aŭskultebla. Forestas nun iom post iom la bruoj.
La 26-an de februaro 1878 naskiĝis Hugo Steiner, la aŭstria Esperanto-pioniro kaj fondinto de la Internacia Esperanto Muzeo en Viento. Ĝuste je lia naskiĝtago la Mallonga Servo de ORF disaŭdigis memorigan felietonon plume de d-ro Karl Beckmann. Hugo Steiner mortis antaŭ 9 jaroj.

El la antaŭlasta elsendo ni publikigas ĵenajn alskribojn al ORF:

"Jes, mi povas aserti, ke aŭstria radio estas vera instigilo por mi. Ege min interesas Heide Apolloner kaj ŝia verko "Nia originala prozo". Bedaŭrinde "Danska Esperanto-Forlag" ne estas por mi atingebla pro transpagaj malfacilaĵoj."

Hella Sauerbrey, Berlin

"Via programteksto pri la Patologio-anatomia Instituto en Vieno kune kun la ĉi-vespera programo - kiun mi sukcesis sekvi mezbone - plilarĝigis nian konon pri Aŭstrio. Koran dankon pro la bone preparitaj programoj!"

Bruno Najbaro, Anglio

"Eble la malbonaj ricev-kondiĉoj estas la kaŭzo de malmultaj alskriboj. Bedaŭrinda estas aliflanke la fakto, ke oni semajno post semajno aŭdas en via leterkesto preskaŭ ĉiam la samajn nomojn."

Norbert Merkens, Wuppertal

Romo. Estas bedaŭrinde ke oni ne povas aŭ nur malbone aŭdi la elsendojn de Radio Roma. Ĉiudimanĉe ni klopodas, sed nur malofte ni sukcesas!
D-ro Antonio De Salvo, la redaktoro de la Esperanto-elsendoj de Radio Roma, nun ja transprenis la redaktadon de Esperanto Katolika, de kie ni ricevis n-rojn 1 + 2/1978. Li ankaŭ redaktas la italan nacian organon. De kie li prenas la tempon kaj energion por tiom diligente verki, por radio kaj revuoj?

Tamen, ankaŭ Radio Roma bezonas multe da korespondaĵoj. Klopodu aŭskulti kaj skribu al la stacio. Jen la adreso: Radio Roma, Esperanto-Fako, C.P. 320, I-00100 Roma 8. Skribu ankaŭ, se vi ne sukcesos aŭdi la stacion!

Varsovio. Kiam mi skribas ĉi tiun numeron, mi samtempe aŭskultas al la Esperanto-elsendo de Radio Varsovio, marde, posttagmeze je la 16,30 h. La elsendo estas bonege aŭdebla, la voĉoj estas fortaj kaj klaraj.
En la radio-ĵurnalo mi aŭdas la informon, ke vizitos Pollandon la hispana ministro pri eksteraj aferoj. Kiaj ŝanĝoj en la mondo. Kiu kredis antaŭ du jaroj, ke hispana ministro vizitos komunistan landon. Pri la rilatoj inter Pollando kaj Hispanio ankaŭ temis la komentario.

Laŭ la lasta leterkesto la Esperanto-redakcio de Pola Radio ricevis dum januaro 566 korespondaĵojn. Je la pinto staras denove GDR kun 100 alskriboj, sekvas Sovetunio kun 84, FR Germanio 82 kaj CSSR kun 81 alskriboj. La leterkesto donis ankaŭ respondon al kelkaj demandoj starigitaj en kelkaj numeroj de Pilo-Press. "Trarigardo de la Esperanto-gazetaro" kaj la "Rubriko por nevidantaj esperantistoj" estonte ne estos aŭdeblaj el Varsovio.
Radio Portugalio. Laŭ diversaj informoj Radio Portugalio nun ĉiutage elsendas unufoje en Esperanto, je la 22-a horo (MET), 49 m. Bedaŭrinde ĝis nun en Nürnberg ni ne sukcesis aŭdi la elsendon. Kiu povas raporti?